El: *Revuo Esperanto, vol. 1046, no 3, marto 1993, p. 53–54:*

**"Kiel esperantisto finis la Nefinitan"**

La Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 1949 okazis en la sudangla marborda urbo Bournemouth. Mi hontas tion konfesi , sed kvankam ĝi estis mia unua sperto de Esperanto-kongreso, mi ne tre multe memoras el tiu grava evento (eble pro tio ke krome temis pri “unua mielmonato” kun mia juna fianĉino, sed kiel muzikamanto mi ja klare memoras ke la programo inkluzivis du notindajn muzikvesperojn). Unu estis recitado kun pluraj eminentaj kantistoj tiutempaj (inter kiuj la konata kontraŭtenora - aŭ knabosoprana - Alfred Deller), kaj la alia estis nekredeble bonkvalita simfonia koncerto prezentita de la Urba Orkestro de Bournemouth.
La dirigento estis Rudolph Schwarz. La programo enhavis komponaĵojn de Rossini, Schubert, Grieg, Elgar, Delibes, Coates, kaj, kompreneble, de Menil, la komponinto de La Espero. En la pianokoncerto A-minora de Grieg la solisto estis Frank Merrick. Sur la programpaĝo de la Kongreslibro aperis piednoto: “… Frank Merrick estas samideano kaj kunaŭtoro de Muzika Terminaro.”

***Butler kaj Merrick***

Eble vi memoras, aŭ eĉ posedas, la modestan, grizkovrilan broŝuron kiu portas tiun titolon. La alia “kunaŭtoro” estis neniu alia ol Montagu Butler, la tre zorgema aŭtoro de Esperanto-English Dictionary (1967). Li estis verŝajne la unua profesia sekretario de la Londona Esperanto-oficejo, kvankam liaj profesiaj kvalifikoj kiel harpisto kaj muzikinstruisto estis tute aliaj. Li poste fariĝis la eduka sekretario de Brita Esperantista Asocio, el kies katedro li povis superigardi la poŝtajn kaj aliajn Esperanto-kursojn, kaj prelegis, ĉefe en lernejoj tra tuta Britio, pri la internacia lingvo. Ŝajnas superflue mencii ke li iniciatis kaj per amo prizorgadis la vastan Bibliotekon Montagu Butler de BEA en Londono (vidu lian nekredeble valoran libron Klasifon de Esperantaj termoj, 1950).
La antaŭparolo de Muzika Terminaro finiĝas per la aliineo:
“Pri mi mem. Ni estis muzikistoj profesiaj: unu (tio estas Butler), Licenciano (licenciuloj de la Reĝa Akademio de Muziko en Londono, la alia (t.e. Merrick), Fratulo kaj Profesoro de la Reĝa Kolegio de Muziko en Londono, kaj konata virtuoza pianisto de la B.B.C. kaj aliloke.”

*Photograph:* “Frank Merrick in 1965"

Kiuj konis la du homojn scias ke ili havis komunaj ankaŭ aliajn interesojn - ambaŭ estis vegetaranoj kaj kvakeroj. La ĉi-lasta kvalito eble estis ankaŭ la fundamenta kaŭzo de iliaj modesteco kaj sincera amikeco.

*teksto:* “La muziko de Merrick foje ŝajnas eĉ pli ŝuberteca ol tiu de Schubert mem."

Sufiĉas diri ke la orkestra koncerto en Bournemouth estis enorma sukceso kaj ke elstaris la koncerto kaj ĝia “virtuoza pianisto”. Min tute ravis tiu artisto, kiun mia patrino jam multajn jarojn “konis” pro liaj radiodissenditaj recitaloj, sed kiun mi persone ekkonis nur la antaŭan semajnon en Londono, kie li kaj la tuta Londona esperanto-klubo kunlaboris por produkti distraĵojn kulturajn kaj malpli kulturajn, ĉe la antaŭkongreso en Londono.
En la postaj jaroj Frank Merrick prezentis sennombrajn recitalojn de la Londona Klubo, kaj en 1965 li fariĝis ĝia Honora Prezidanto. En la jaro 1966 li festis sian 80-jariĝon per publika recitalo en Wigmore Hall. La aŭdantaro  konsistis ne nur el liaj familianoj, studentoj, kunprofesoroj kaj privataj admirantoj, sed ankaŭ el konsiderinda nombro da konataj komponistoj, muzikistoj diversaj, kaj eminentaj reprezentantoj de BBC, krome, ĉeestis impona delegacio de la Londona Esperanto-Klubo. Lia serena, digna vizaĝo montris neniun signon de streĉiteco kiam li frontis tian grandan ĉe-estantaron por prezenti programon kies kombino de delikateco kaj komplikeco defiis multajn pianistojn de malpli matura aĝo. Li sukcesis konverti la laŭ mi kutime frid-atmosferan publikon de Wigmore Hall al neforgesebla etoso de senspira admiro kaj ŝato. La varma aplaŭdo elvokis larmojn en la okuloj kaj ne volis ĉesi. Mi ne memoras kiom da bisoj li devis ludi.

***La Londona Klubo kaj Merrick***

Dek du jarojn poste ankaŭ la Londona Klubo ĝuis jubileon, sian 75-jaran, danke al kiu ni povas ekscii iom pli pri nia esperantisto-muzikisto. Se mi rajtas citi el la libro “Londono vokas” (historio de la Londona E-Klubo, verkita de Harry Holmes):

“Ĉeestis la Honora Prezidanto, s-ro Frank Merrick, pli ol 90 jarojn aĝa. Li rakontis interesajn spertojn. Dum la unua mondmilito li estis malliberigita ĉar li estis milit-rifuzanto. Por distri sin li petis materialon por studi lingvon kaj la mallibereja bibliotekisto provizis lin per lernolibro pri Esperanto. Tiel li lernis la lingvon.”

Serĉinte lian nomon en mia (jam malnova) muzika enciklopedio The Concise Oxford Dictionary of Music, mi trovis: “MERRICK, FRANK (nask. en Bristolo, 1886). Pianisto, filo de d-ro Frank Merrick kaj studento lia. Studis (kun Paderewski) ĉe Teodor Leŝeticki en Vieno. Instruis ĉe la Reĝaj Kolegioj de Muziko de Manĉestro (1911) kaj de Londono (1928).

*Photograph:* "Franz Schubert (1797-1828)" *kun la teksto:*
"Lia oka simfonio estas kompletigita kun kompreno kaj amo."

Komponis i.a. verkojn por orkestro, pianokoncertojn, kaj kompletigon de la Nefinita Simfonio en 1928.”

Mia libreto ne mencias la nomon de la komponinto de tiu “Nefinita Simfonio”, sed ĉiu muzikamanto scias ke temas pri la Oka Simfonio de Schubert.

***Schubert kaj Merrick***

Franz Schubert komponis sian okan simfonion en 1822, sed finverkis nur du movimentojn el la kutimaj kvar. En 1928 la konata gramofonkompanio Columbia, por (mal)festi la 100-an datrevenon de la morto de Schubert, lanĉis internacian konkurson por komponistoj. La deviga komponaĵo estis: du movimentoj por orkestro por taŭge kompletigi la Nefinitan Simfonion.

Frank Merrick komentis: “Kiam oni anoncis la konkurson, mia tuja impreso ne estis favora, sed post pensado pri la temo, pli kaj pli obsedis min la demando kiel Schubert estus daŭriginta por fini la komponaĵon. Mi post nelonge venis al la konkludo ke la tria movimento, sendube skerco, verŝajne malfermiĝus per severa temo en nudaj oktavoj. Kvankam mi forĵetis mian unuan provon de melodioza trio, la dua provo de la unua (=tria) movimento estis rapide finita. Nur poste mi legis ke Schubert postlasis skizojn por la skerco. Mi sukcesis akiri ilin, kaj provante ilin konvinkiĝis ke Schubert forlasis la komponaĵon klare pro malinspiro - la trio estis elstare malmerita kompare kun la grandiozaj unuaj movimentoj. Ĉu li estis, do, malsana? Aŭ ĉu, pli verŝajne, alia entrepreno okupis lian atenton? Ĉiukaze, por li la sorĉa magio estis rompita, kaj por liaj posteuloj restis nur nesatigebla scivolo kaj spekulativa provado. El mia vidpunkto, tamen, estas interesa observi ke la skerco ja komenciĝis kiel mi supozis, per nudaj oktavoj.” Priskribinte la malfacilaĵojn de la lasta movimento, Merrick daŭriĝas: “La juĝistoj estis Sir Thomas Beecham kaj tri aliaj tre konataj muziko-kleruloj. Mia movimentoj gajnis premion; Sir Hugh Allen (unu el la juĝistoj) deklaris ke mia komponaĵo estas kombino de kompreno kaj amo.”

***Mi kaj Merrick***

Kiam mi denove foliumis tra mia oksforda muzikokompendio, tre impresis min la fakto ke ĉe la kapvorto “Schubert - Simfonio N-ro 8” oni legas: “La Nefinita (1822). Kompletigon provizis Frank Merrick kaj aliaj.” Interese ke la nomoj de la aliaj ne meritis mencion! Tamen, kun tiu honoro al ili, mi ne povas imagi muzikon pli taŭgan ol tiu de Merrick. Al miaj oreloj ĝi foje ŝajnas eĉ pli ŝubereca ol tiu de Schubert mem. Kiam mi rerigardas la programon de tiu koncerto en Bournemouth, mi legas, kun eta doloropiko, ke la komponaĵo de Schubert estis ĝuste “la Nekompleta”. Mi konkludas ke nur lia modesteco malebligis al li kapti tiun okazon por konigi tiun majestan muzikon al la kongresanaro.

Johano Rapley